



INFORMILO

Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)

2-2026(143) aprilo ĝis junio

Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka

Blaža Polića 2 51000 RIJEKA Hrvatska-Kroatio

Tel.++385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986

Redaktoro: Dr.sc. Ana Alebić-Juretić, dipl.inĝ. tel.: 091 563 1634

Rijeka, la 20-an de julio 2026.

Karaj gesamideanoj,

la printempa numero de Informilo priskribas la elektaĵan kunvenon de KEL kiu okazis la 20-an de junio 2026 en Karlovac. Kelkajn tagojn antaŭ la kunveno forpasis Ivo Osibov, la tre grava esperantisto el Split. Post la kunveno, la germana esperantistino Michaela Stegmaier vizitis nin travojaĝante Rijekon. Esperanto societo Rijeka donacis du kopiojn de la esperanta traduko de *Pratempaj rakontoj* al biblioteko de la *Memora domo Ivana Brlić-Mažuranić* en Rijeko. Nia membro ankaŭ partoprenis en la jara kunveno de Triesta Esperanto Asocio.

LA 14-a JARA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

En tiu ĉi jaro nova estraro de KEL (Kroata Esperanta Ligo) estis elektita dum la jara kunveno en Karlovac kiu okazis la 20-an de junio 2026. Karlovac estis la loko kie en 1939 okazis la lasta kunveno de JEL (Jugoslava Esperanta Ligo) antaŭ la dua mondmilito. Pro financa kialo, la kunveno ne povis esti organizita en Domo de Zora, kie okazis antaŭ 87 jaroj la nomita kunveno, sed la ejo estis la nova dolĉakva akvario *Aquatica*. La nova elektita estraro de KEL estas:



La 14-a kongreso de KEL en Karlovac

prezidanto **Ivan Špoljarić**, sekretariino: **Ankica Jagnjić**, vicprezidantoj: **Spomenka Štimec**, **Mihaela Cik kaj Gordana Grubišić-Popović**, estraranoj: **Ana Alebić-Juretić**, **Siniša Dvornik**, **Filip Ivančić**, **Robert Milijaš**, **Đivo Pulitika kaj Ljerka Stilinović**. Ni deziras al ili bonan laboron. Ni ankaŭ devas danki al du grandaj esperantistoj **Spomenka Štimec** kaj **Anto Mlinar** por ilia iaman bonan gvidon de KEL. En la kunveno partoprenis ankaŭ gastoj de Germanio, Hungario, Svedio kaj Ukrainio.

En kultura programo partoprenis esperantistino de Ukrainio **Nina Danylyuk** kiu prelegis pri *Evgenij Eroŝenko*. Krom la prelego, kultura programo enhavis du prezentaĵojn de libroj: **Zdravko Seleš** el **Đurđevac** prezentis sian poemaron *Spuroj/ Tragovi* kaj **Darija Budiša** kaj **Lidija Leskovar** el Esperanto societo Split prezentis la libron de **Danica Bartulović** kaj **Lidija Leskovar**: *Vjesnice ljubavi/Mesaĝistinoj de amo*.

Krom la kunveno ni vizitis la urbon mem, la tre bone organizitan dolĉakvan akvarion *Aquatica*, kiu montris al ni alian subakvan vivon ol kiun ni scias, kaj du kastelojn en la ĉirkaŭo **Dubovac** kaj **Ozalj**. La kunveno estis tre bone organizita de DEC kaj **Josip Pleadin**. Laŭ la plano, li devus organizi aliajn du: en **Delnice** kaj **Vukovar**. Bedaŭrinde, li rezignis pri tio, sed iuj partoprenantoj ne aŭdis aŭ ne komprenis tion. Eble ni ankoraŭ povus atendi ke li organizos la sekvontan kunsidon en **Delnice**.

(Verkis kaj fotis **A. Alebić-Juretić**)

IN MEMORIAM

IVO OSIBOV (1937-2026)



La 10-an de junio 2026 forpasis en Split **Ivo Osibov**, tre grava kaj tre konata kroata esperantisto. Li diplomiĝis pri juro en 1960 kaj finis magistrajn studojn en 1985 ĉe la Universitato de Zagrebo. Li laboris en industrio kaj poste kiel preleganto ĉe la Fakultato de juro en Split. Li esperantistiĝis dum la mezlernejo kaj okupis multajn gravajn

postenojn en esperanta movado en Kroatio kaj iama Jugoslavio. Li estis estrarano kaj prezidanto de TEJO kaj ĝenerala sekretario de UEA.

(A.A.-J., fotis Z. van Dijk)

VIZITO DE GERMANA ESPERANTISTINO

Trairante la vojon por atingi Sveti Juraj (Sankta Georgo) kie ŝi devintus partopreni en la kleriga seminario pri naturparkoj, Michaela Starmaier el Esperanta urbo Herzberg am Herz (Informilo No 132 -2/21 skribis pri tiu urbo), ĉeestis nian 14-an kongreson de kroataj esperantistoj en Karlovac. Post seminario ŝi vizitis Rijekon antaŭ ol daŭrigi la vojaĝon per trajno. Tiu vojaĝo estis vera aventuro, kaj la trajno malfruis du horojn kaj duonon. Tiel ŝi devis daŭrigi ŝian vojaĝon per buso de Ljubljano ĝis Munkeno.



Michaela antaŭ la domo de Esperanto klubo en Rijeko

Tamen, ni havis tempon por rapide viziti la urbon kaj najbarajn urbetojn kun strandoj. Ni renkontos nin dum UK en Graz.

(verkis kaj fotis A. Alebić-Juretić)

DONACO DE LIBROJ

La Memordomo de familioj Brlić-Mažuranić-Ružić en Rijeko enhavas grandan bibliotekon kun multaj novaj kaj malnovaj libroj. Oni trovas ĉi tie ankaŭ plurajn tradukojn de famaj infanaj libroj verkita de fama verkistino **Ivana Brlić Mažuranić**. Multaj tiuj tradukoj estis faritaj per Esperanto. Tial, Esperanto-societo Rijekas decidis doni al la biblioteko du ekzemplerojn de la Esperanto traduko de *Pratempaj rakontoj*. Dum la printempa festo en ĝardeno okazinta la 11-an de junio 2026, la libroj estis donitaj al kuratoro de la Memordomo Theo de Canziani.

Estas interese ke la verkistino, kiu vizitis plurajn fojojn Sušakon (tiam apartan urbon) neniam loĝis en tiu domo sed en la najbara hotelo Jadran, kie ŝi invitis siajn kuzojn.



La printempa festo en ĝardenoj de la Memordomo Brlić-Mažuranić-Ružić kun la gvidanto de domo Theo de Canziani (verkis kaj fotis A. Alebić-Juretić)

JARA KUNVENO DE TEA

Dimanĉon, la 10-an de majo 2016. okazis la jara kunveno de Triesta Esperanta Asocio (TEA). Krom la elekto de novaj estraranoj, oni parolis pri la festado de la 120-a datreveno de la fondiĝo de la Asocio. Kiel ili jam havis la monografion de la asocio, dum la tuta jaro oni planas plurajn prelegojn de Davide Astori, la konata lingvisto kaj esperantisto kaj organizon de Kartstaj Tagoj. Gratulojn al nia tre proksima asocio!



La jara kunvenmo de TEA en Triesto (verkis kaj fotis A. Alebić-Juretić)

Provleganto: Elda Dörfler